

SCENO 1 (INFORMEJO)

HELENA: Saluton, sinjoro!

RUSELO: Ho! Saluton, sinjorino!

HELENA: Ne... ne sinjorino. Fraŭlino.

RUSELO: Ho... fraŭlino, jes! Fraŭlino Helena. Saluton!

RUSELO/HELENA: Sed ...?

HELENA: Skulptisto. Mi estas skulptisto.

RUSELO: Skulpt – ist – o?

HELENA: Skulptisto. Jen! Mi estas skulptisto!

RUSELO: Ho! Skulptisto! Jes. Mi komprenas. Kaj mi... mi estas ŝafisto! Jen mia ŝafo.

HELENA: Ho! Ŝafisto... kaj ŝafo! Saluton, ŝafo!

HELENA/RUSELO: Sinjoro: kiel... ? / Fraŭlino: strato... ?

RUSELO: Strato Espero... kie... kie estas strato Espero?

HELENA: Kie estas strato Espero? Ho, facile. Jen, rigardu! Iru tie dekstren...

RUSELO: Ne! Ne! Mi ne komprenas! Mi ne komprenas!

HELENA: Kio? Ho! Vi ne komprenas! Nu... strato Espero. Jen: strato Espero, sinjoro. Kaj jen ni...

SCENO 2 (BONVOLO-HEJMO)

KARLO: Unu, du, mi ĵonglas... be! Unu, du, mi ĵonglas... be!
Ho, dankon, Panjo. Unu, du, mi ĵonglas...

GEORGO: Ho! He! Kio? Mi legas!

FILISA: Vi ne legas, Georgo. Jen! Filozofoj!

GEORGO: Ho, dankon! Jes! Mi legas...

JOLANDA: Saluton, Panjo!

FILISA: Saluton, Jolanda!

JOLANDA: Saluton, Paĉjo! Paĉjo?

FILISA: Jen mia Georgo. Filozofoj!

GEORGO: A? He? Kio?

JOLANDA: Saluton!

GEORGO: Ho! Jes... saluton, Jolanda!

JOLANDA: Kaj... saluton, Karlo.

KARLO: Unu, du, unu, du, mi ĵonglas... be!

JOLANDA: Vi ne ĵonglas. Sed, saluton!

KARLO: Be! Ne "Saluton"! Ĝis la revido! Mi kuras... Mi kuras... ĝis la revido, ĝis! Unu, du, unu, du...

GEORGO: A! He! Kio...?

JOLANDA / FILISA: Paĉjo! / Georgo!

SCENO 3 (INFORMEJO)

HELENA: Ĝis la revido, sinjoro! Ĝis! Ĝis la revido, ŝafo! Ĝis!

RUSELO: Ĝis, fraŭlino Helena! Ah, kaj dankon!

HELENA: Strato Espero? Kio? Strato Espero? Ne!

KENĜI: Saluton, sinjorino!

HELENA: Ho! Saluton, sinjoro! Sed... mi ne estas sinjorino. Mi estas fraŭlino. Fraŭlino, sinjoro.

SCENO 4 (EN LA STRATO)

KARLO: Unu, du, tri, kvar... mi kuras, mi kuras... unu, du, tri, kvar... mi kuras...

SCENO 5 (INFORMEJO)

KENĜI: Jes, fraŭlino, mi estas raportisto... Radio-raportisto!

HELENA: Bone! Sed...

KENĜI: Kaj mia nomo estas Suzuki Kenĝi... Ken! Mia nomo estas Ken!

HELENA: Ho! Jes! Saluton, Ken! Kaj mia nomo estas Helena... Helena Bonvolo. Sed sinjoro...

KENĜI: Kaj mi venis de Japanio... Japanio, en Azio, fraŭlino.

HELENA: Jes ... vi venas de Azio. Sed...

KENĜI: Nu, fraŭlino... hodiaŭ ni sidas en la informejo Bonvolo kaj fraŭlino... Helena Bonvolo...

SCENO 6 (EN LA STRATO)

RUSELO: Mi ne komprenas. Kie estas strato Espero? Kie estas la strato, ŝafo? Kie?

SCENO 7 (INFORMEJO)

HELENA: ... kaj mia nomo estas Helena Bonvolo. Mi estas skulptisto, sed hodiaŭ mi sidas en la informejo Bonvolo. La informejo estas en la urbo...

SCENO 8 (EN LA STRATO)

KARLO: Mi ne kuras, sed mi ĵonglas. Unu, du, tri, kvar, kvin, ses... be! Mi ne ĵonglas! Mi kuras. Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ...

SCENO 9 (INFORMEJO)

KENĜI: Dankon, fraŭlino ... dankon! Jen bona intervjuo.

HELENA: Jes, bona intervjuo. Nu, ĝis la revido. Ĝis!

KENĜI: Ĝis la revido!

SCENO 10 (BONVOLO-HEJMO)

FILISA: La telefono, Georgo. Sonas la telefono! Georgo!

GEORGO: A! He! Kio? Mi legas. Mi legas!

FILISA: Ho, filozofoj! Vi ne legas! Vi dormas! Sed Georgo, la telefono! La telefono sonas! ... Ha-lo! Filisa Bonvolo. Saluton, Helena! Kiel vi fartas? Kio? Ho, terure... !

SCENO 11 (EN LA STRATO)

RUSELO: A, terure! Ŝafo, kie mi estas... kie? Ne, ŝafo, mi ne komprenas!

KARLO: Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, mi kuras...

RUSELO: Sinjoro! Strato Espero, kie estas strato Espero?

KARLO: ...sep, ok, naŭ, dek...

RUSELO: Terure! Unu, du, mi kuras... ah, terure!

SCENO 12

FILISA: Jes... terure! Hodiaŭ venas nia gasto... nia gasto el Nov-Zelando.

GEORGO: Kio? Nov-Zelando?

FILISA: Jes, jes. Nov-Zelando. Nia Pasport-Serva gasto.

GEORGO: Ho! La Pasporta Servo! Sed hodiaŭ estas dimanĉo. La gasto ne venas hodiaŭ.

JOLANDA: Paĉjo! Hodiaŭ estas lundo! Lundo! Ne dimanĉo!

FILISA: Jes! Hodiaŭ venas la gasto! Nu... Georgo! Georgo! Litotuko! Litotuko por la gasto!

GEORGO: Lito? Lito?

FILISA: Ne, ne... ne lito! Filozofoj! Litotuko! Tuko!

SCENO 13 (EN LA STRATO)

KARLO: ...kvar, kvin, ses, atleto kuras, kuras...

RUSELO: ...sep, ok, ah... naŭ... ah, ŝafisto ne kuras, ne kuras... ok, naŭ, dek... ho, terure!

SCENO 14 (BONVOLO-HEJMO)

FILISA: Nu! Jolanda! Kap-kuseno! Kap-kuseno por la gasto!

JOLANDA: Jes! Kap-kuseno! Bone!

GEORGO: Jen, Filisa! Jen litotuko! Litotuko por la gasto!

FILISA: Dankon, Georgo! Bone! Nu! Lit-kovrilo, Georgo... lit-kovrilo!

GEORGO: Jes! Bone! Lit-kovrilo! Mi kuras... unu du, unu du, unu du...

JOLANDA: Jen, Panjo! Jen kap-kuseno! Kap-kuseno por la gasto!

FILISA: Dankon, Jolanda! Bone! Nu... man-tuko, Jolanda, man-tuko!

JOLANDA: Jes! Man-tuko! Bone!

GEORGO: Ho, jen, Filisa! Jen lit-kovrilo! Lit-kovrilo por la gasto!

FILISA: Dankon, Georgo! Bone! Nu... ban-tuko, Georgo, ban-tuko!

GEORGO: Man-tuko?

FILISA: Ne, ne, Georgo! *Ban-tuko*, kun *Bo* ... ne *man-tuko*, kun *Mo*!

GEORGO: Ho! Jes! Ban-tuko... kun Bo! Mi kuras... unu du, unu du...

SCENO 15 (EN LA STRATO)

KARLO: ...ses, sep, ok, naŭ, dek... mi ĵonglas... Be!

RUSELO: Vi ne ĵonglas, sinjoro. Sinjoro... mi ne estas atleto, mi estas ŝafisto...

KARLO: Unu, du, tri, kvar...

RUSELO: Ho, Terure! Unu, du, tri, mi kuras...

SCENO 16 (BONVOLO-HEJMO)

JOLANDA: Jen, Panjo! Jen man-tuko! Man-tuko por la gasto!

FILISA: Dankon, Jolanda! Bone!

GEORGO: Kaj jen, Filisa! Jen ban-tuko! Ban-tuko por la gasto!

FILISA: Dankon, Georgo! Bone! Nu... sapo... sapo por la gasto!

GEORGO/JOLANDA: Ho... sapo. Nu...

KARLO: ...sep, ok, naŭ, dek. Dek... bone!

FILISA: Saluton, Karlo. Kiel vi fartas?

KARLO: Bone, dankon. Bone. Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek... Be!

JOLANDA: Jen sapo, Panjo. Jen!

KARLO: Be! Jen *mia* sapo, *mia*!

GEORGO: Jen sapo. Jen sapo por la gasto... la gasto el Nov-Zelando.

FILISA: Sed... kie estas la gasto?

KARLO: Jen via gasto!

RUSELO: Jes... mi... ho! Mi estas via gasto... kaj jen... *mia* pasporto! *Mia* pasporto al la tuta mondo! Sed...

GEORGO: Ho, terure... terure, nia gasto!

FILISA: Jolanda... akvo! Akvo por nia gasto!

GEORGO: Jen... jen seĝo por vi, sinjoro.

FILISA: Ho! Terure, katastrofe! Nu... kiel vi fartas, sinjoro?

RUSELO: Ho... nu...

JOLANDA: Jen... jen akvo por vi, sinjoro.

RUSELO: Ho, dankon. Dankon!

FILISA: Nu... sinjoro... kiel vi fartas?

RUSELO: Nu... bone, dankon. Sed...

FILISA: Kio, sinjoro? Kio?

RUSELO: Ne, ne "sinjoro." Ne! *Mia* nomo estas...

GEORGO: Bruselo!

FILISA: Filozofoj!

JOLANDA: Paĉjo! Bruselo, kun Bo, estas urbo.

FILISA: Urbo en Eŭropo.

JOLANDA: Bruselo, Paĉjo... en Eŭropo.

FILISA: Nia gasto ne estas Bruselo, sed Ruselo... kun Ro.

RUSELO: Jes! Mia nomo estas Ruselo! Kun Ro!

GEORGO: Ho, terure! Jes ... Ruselo! Saluton, Ruselo! Kiel vi fartas?

RUSELO: Nu, mi bone fartas, dankon. Sed ho, mi estas laca. Mi ne estas atleto, mi estas ŝafisto. Jen mia ŝafo.

FILISA: Saluton, ŝafo! Kiel vi fartas?

JOLANDA: Saluton, ŝafo!

GEORGO: Saluton, ŝafo! Kiel vi fartas?

KARLO: Ŝafo...? Be! Be!

GEORGO: Jes! La ŝafo bone fartas!

RUSELO: Sinjoro...

GEORGO: Ne "sinjoro"! Mia nomo estas Georgo. Georgo Bonvolo. Mi estas filozofo. Greka filozofo.

RUSELO: Greka? Greka...? Mi ne komprenas.

GEORGO: Nu, vi venas el Nov-Zelando, kaj greka filozofo venas el Grekio. Jen Grekio, Grekio en Eŭropo.

RUSELO: Ho! Mi komprenas. Dankon, Georgo.

FILISA: Kaj mia nomo estas Filisa... Filisa Bonvolo. Mi ne estas filozofo. Mi estas dancisto. Mi dancas...

RUSELO: Ho! Vi bone dancas!

FILISA: Ne, ne, Ruselo. ŝafistoj ne bone dancas. Vi ne estas dancisto.

RUSELO: Ne! Kaj ŝafistoj ne estas atletoj.

GEORGO: Ho! Jen nia atleto... nia filo, Karlo.

RUSELO: Saluton, Karlo.

KARLO: Ŝŝ. Mi laboras. La atleto laboras...

FILISA: Ho, Karlo. Atletoj!

JOLANDA: Kaj mi estas Jolanda, Jolanda Bonvolo... mi estas juĝisto.

RUSELO: Juĝisto! Kaj vi estas la filino de Filisa kaj Georgo.

JOLANDA: Jes! Mi estas la filino de Filisa kaj Georgo. Karlo estas la filo.

RUSELO: Filino... filo... Filisa estas via patrino... Georgo via patro.

FILISA: Jes. Kaj mi estas la edzino de Georgo.

GEORGO: Kaj mi estas la edzo de Filisa.

JOLANDA: Jen, Ruselo, jen la familio Bonvolo. Jen Georgo kaj Filisa, edzo kaj edzino, patro kaj patrino; kaj jen Karlo kaj mi, filo kaj filino, frato kaj fratino. Kaj jen...

GEORGO: Jen, Brus... Ruselo. Jen la familio Bonvolo!

KARLO: Ne! Ni ne estas la familio Bonvolo!

GEORGO/FILISA/JOLANDA: Kio?

GEORGO: Ni *ne* estas la familio Bonvolo? Mi ne komprenas!

FILISA: Ankaŭ mi ne komprenas!

RUSELO: Ankaŭ mi ne komprenas!

KARLO: Ni ne estas la familio Bonvolo. Jen la patro, Georgo, unu; jen la patrino, Filisa, du; jen Jolanda, la filino, tri; jen mi, la filo, kvar... sed kie estas kvin? Kie estas mia fratino

Helena?

RUSELO: Helena?

GEORGO: Ho! Mi komprenas! Filozofoj!

FILISA: Ho, jes, Helena! Jolanda estas nia unua filino... kaj Helena estas nia dua filino.

GEORGO: Sed hodiaŭ ŝi laboras en la urbo... en la informejo Bonvolo.

RUSELO: La fraŭlino en la informejo! Estas ŝi!

KARLO: Jes! Hodiaŭ Helena laboras en la informejo. Hodiaŭ ni *ne* estas la familio Bonvolo.

FILISA: Jen, Ruselo! Jen la familio Bonvolo: Georgo kaj mi, edzo kaj edzino, patro kaj patrino; jen Karlo, Jolanda kaj Helena, filo kaj du filinoj, la unua kaj la dua, frato kaj du fratinoj. Jen la familio Bonvolo! Ho! Vi estas laca. Vi venas el Nov-Zelando, vi kuras kaj kuras, vi ŝvitas... jes, vi estas laca. Do, jen, Ruselo. Jen por vi. Jen via litotuko...

RUSELO: Ho! Mia litotuko, dankon!

FILISA: Jen via kap-kuseno...

RUSELO: Mia kap-kuseno, dankon!

FILISA: Jen via lit-kovrilo...

RUSELO: Mia lit-kovrilo, dankon!

FILISA: Jen via man-tuko...

RUSELO: Mia man-tuko, dankon!

FILISA: Jen via ban-tuko...

RUSELO: Mia ban-tuko, dankon!

FILISA: Jen via sapo.

RUSELO: Mia sapo, dankon.

KARLO: Be, *mia* sapo!

RUSELO: Jen, Karlo... por vi!

KARLO: Kio...?

RUSELO: Sed... jen mia litotuko, mia lit-kovrilo, mia lito! Mia dormosako! Jen mia man-tuko, jen mia ban-tuko, kaj jen mia kap-kuseno!

FILISA: Ho, Ruselo... vi estas bona gasto.

RUSELO: Kaj jen mia sapo!

KARLO: *Via* sapo? Mia! Unu, du, tri...

GEORGO/FILISA/JOLANDA: Ne, Karlo! Ne!

GEORGO: Kio?

FLORA: Ne! Ne! Ne! Ho... terure! Terure!

FILISA: Sinjorino Bundo! Kio estas?

FLORA: Ho! Terure! Katastrofe! Katastrofe...!

-a (*adjective ending*)
akv/o water
al to; towards (*preposition*)
ankaŭ also
-as (*present tense verb ending*)
atlet/o athlete
aŭ or (*conjunction*)
Azi/o Asia
ban/i to bathe; **~tuko** washcloth
be! bah! (*exclamation*)
bon/a good; **~e** well; **~volo** goodwill;
~venon! welcome!
danc/i to dance; **~o** a dance
dank/i to thank; **~o** thanks;
~on! thank you!; **~a** grateful
de of; from (*preposition*)
dek ten; **~a** tenth (10th)
dekstr/a right (side); **~en** to the right
dimanĉ/o Sunday
dir/i to say
dorm/i to sleep; **~o** sleep
du two; **~a** second (2nd)
-e (*adverb ending*)
edz/o husband; **~ino** wife
-ej (*suffix indicating place*); **dorm~o**
 bedroom; **inform~o** information center
el out of; from (*preposition*);
mi venas ~ Nov-Zelando I come from
 New Zealand
en in, inside (*preposition*)
esper/i to hope; **~o** hope
est/i to be
Eŭrop/o Europe
facil/a easy
famili/o family
fart/i to be (fare);
kiel vi ~as? how are you?
fil/o son; **~ino** daughter
filozof/o philosopher
frat/o brother; **~ino** sister
fraŭ/o bachelor;
~ino bachelorette; Miss
gast/o guest
grek/o Greek (person); **~a** Greek;
~ujo, ~io Greece
ĝi it (*pronoun*); **~a** its
ĝis until; (up)to;
~ (la) revido see you later; **ĝis!** bye!
ĝu/i to enjoy
ha-lo? Hello? (*telephone greeting*)
hejm/o home
he? eh? (*exclamation*)
ho! oh! (*exclamation*)
hodiaŭ today
hom/o human, person
-i (*infinitive verb ending*)
-il (*suffix denoting a tool, implement*);
kovr~o a cover; **litkovr~o** a blanket
-in (*suffix denoting a female*); **fil~o**
 daughter; **patr~o** mother

inform/i to inform, tell; **~o** information;
~ejo information center
intervju/o an interview
ir/i to go
-ist (*suffix denoting an occupation*);
danc~o dancer; **ŝaf~o** shepherd
-j (*plural ending*)
japan/o Japanese (person);
~ujo, ~io Japan
jen here's...
jes yes
juĝ/i to judge; **~isto** judge
jus just (a moment ago)
kaj and
kap/o head (of body); **~kuseno** pillow
katastrof/o catastrophe;
~e! What a catastrophe!
kie where
kiel how
kio what (thing)
kompren/i to understand
kovr/i to cover; **~ilo** cover, lid
kun with (*preposition*)
kur/i to run
kusen/o cushion; **kap~o** pillow
kvar four; **~a** fourth (4th)
kvin five; **~a** fifth (5th)
la the (*article*)
labor/i to work
lac/a tired
leg/i to read
li he (*pronoun*); **~a** his
lit/o bed; **~(o)tuko** bedsheet
lund/o Monday
man/o hand; **~tuko** hand-towel
mi I, me (*pronoun*); **~a** my
mond/o world
naŭ nine; **~a** ninth (9th)
ne no; not
ni we (*pronoun*); **~a** our
nom/o name
Nov-Zelando/o New Zealand
nu now; well... (*interjection*)
-o (*noun ending*)
oft/e often
ok eight; **~a** eighth (8th)
paĉj/o dad, pop, daddy
panj/o mom, ma, mommy
pasport/o passport
patr/o father; **~ino** mother
por for (*preposition*)
radi/o radio
raport/i to report; **~isto** reporter
re- (*prefix indicating repetition*);
~vidi to see again
rigard/i to look (at), watch; **~u!** look!
sak/o bag; sack;
dorm(o)~o sleeping bag
salut/i greet; **~o** greeting; **~on** hello!
sap/o soap

sed but (*conjunction*)
seĝ/o chair, seat
sep seven; **~a** seventh (7th)
serv/i to serve; **~o** service
ses six; **~a** sixth (6th)
sid/i to sit
sinjor/o, s-ro sir; gentleman; Mr.;
~ino, s-ino madam; lady; M(r)s.
skulpt/i to carve, sculpt; **~isto** sculptor
son/i [*intr.*] to sound, ring; **sonas la**
telefono! the telephone's ringing!
strat/o street
ŝaf/o sheep; **~isto** shepherd
ŝi she (*pronoun*); **~a** her
ŝvit/i to sweat
telefon/o telephone
terur/o terror; **~e** terribly; **tie** there; **~e!**
 terrible!
tie there
tio that (thing)
tri three; **~a** third (3rd)
tuk/o piece of cloth;
lit(o)~o (bed)sheet;
ban~o bath towel
tut/a entire, whole
-u (*imperative verb ending*)
unu one (*number*); **~a** first (1st)
urb/o city, town
urg/a urgent
ven/i to come
vi you (*pronoun*); **~a** your
vid/i to see; **ĝis la re~o!** see you later!
viv/i to live; be alive